31-a Internacia Festivalo

27 dec 2014 – 3 jan 2015

nia adiaŭa IF en Jülich

(kun plilongiga ebleco ĝis 4 jan 2015)

Kadra temo: novaj energioj

- **konciza programo**
  (sekvantaj paĝoj)
- **detala programo**
  (paĝoj 22 - 28)
- **salonoj** (prelegoj, kursoj)

Jülich *[Jiliĥ]*	**dua etaĝo**	*(koridoro: tute malantaŭe)*
Köln *[Køln]*	**dua etaĝo**	*(koridoro: dua dekstraflanke)*
Kelmis	**dua etaĝo**	*(koridoro: unua dekstraflanke)*

... niaj multflankaj ofertoj bonvenigas vin!

INTERNACIA • 31-A IF • FESTIVALO

matena programo:	**10.00 h - 11.30 h**
tagmanĝo:	12.00 h - 13.00 h
posttagmeza sesio I:	**13.30 h - 15.00 h**
kafopaŭzo:	15.00 h - 16.30 h
posttagmeza sesio II:	**16.30 h - 18.00 h**
vespermanĝo:	18.30 h - 19.30 h
vespera programo:	**20.00 h - 21.30 h**

INTERNACIA FESTIVALO

www.internacia-festivalo.de ... jarfine al IF

(superrigardo) — KONCIZA

Horo	sab 27 dec	dim 28 dec	lun 29 dec	mar 30 dec
07.30 - 09.30	(matenm. helpantoj)	matenmanĝo	matenmanĝo	matenmanĝo
10.00 - 11.30	(Preparoj)	• Dimanĉa Matineo Aktuala prelego Rusio kaj Ukrainio *(salono Jülich)*	• IVU-prelego Energi-ŝanĝiĝo I *(salono Jülich)* • Vegana vivo *(salono Köln)* • Paroliga kurso *(salono Kelmis)*	**9.30 h ◄** • Tuttaga ekskurso Köln • Ne-ekskursantoj: urbo / urba naĝejo
12.00 - 13.00	(tagmanĝo helpantoj)	tagmanĝo	tagmanĝo	tagmanĝo
13.30 - 15.00	Alveno	• Aliaj alirmanieroj al malsanoj *(salono Jülich)* • Urba promeno *renkont: ĉefa elirejo*	• IVU-prelego Misia agado Japanio *(salono Jülich)* • 'Brückenkopf-Park' *renkont: ĉefa elirejo*	• Tuttaga ekskurso Köln • Ne-ekskursantoj: urbo / urba naĝejo
15.00 - 16.30	(kafopaŭzo)	kafopaŭzo	kafopaŭzo	kafopaŭzo
16.30 - 18.00	Alveno	• Argentino - la nordo *(salono Jülich)* • Aŭtora horo Caragea *(salono Köln)*	• Argentino - Gaŭĉoj... *(salono Jülich)* • Kunlaboro ĵurnalistoj *(salono Köln)*	• Tuttaga ekskurso Köln • Ne-ekskursantoj: urbo / urba naĝejo
18.30 - 19.30	vespermanĝo	vespermanĝo	vespermanĝo	vespermanĝo
20.00 - 21.30	• **Interkona Vespero** kun Mikaelo *(manĝego)*	• **Latva Vespero Vento Baltia** (grupo el Rigo) *(salono Jülich*	• **Rusa Vespero** Vera kaj Mikaelo invitas *(salono Jülich)*	• **Koncerto Barda liriko** kun Nataŝa *(salono Jülich)*
21.30 - ...	Knajpo	Knajpo	Knajpo	Knajpo

PROGRAMO — (superrigardo)

mer 31 dec	ĵaŭ 1 jan	ven 2 jan	sab 3 jan	Horo
matenmanĝo		matenmanĝo	matenmanĝo	**07.30 - 09.30**
• IVU-prelego Energi-ŝanĝiĝo II *(salono Jülich)* • Eldonejo Impeto *(salono Köln)*	**10 h ĝis 13 h:** • **Novjara brunĉo** ▼ matenmanĝo kaj ekde 11.00 h varma manĝo	• Elektraj aŭtomobiloj *(salono Jülich)* • Vikipedio *(salono Köln)* • Elfosejo Hambach *renkont: parkejo*	• Adiaŭo **Komenco de la plilongiga tago** • Rilato kun Rusio *(salono Kelmis)*	**4 jan: (plilongigo)** • Komuna matenmanĝo **je 8.30 h** • Adiaŭo
tagmanĝo		tagmanĝo	tagmanĝo	**12.00 - 13.00**
• IVU-prelego Einstein *(salono Jülich)* • Fabelaj mondoj *(salono Köln)*	• Novjara promeno Rivero Rur *renkont: ĉefa elirejo* • Novjara saŭno *renkont: dua etaĝo*	• IVU-prelego teleskopo Kepler *(salono Jülich)* • Didaktika leciono *(salono Köln)*	**Plilongigo** • Ekskurso al la Trilanda Punkto DE-NL-BE (aŭtobuso inkl.) *renkont: ĉefa elirejo*	**13.30 - 15.00**
kafopaŭzo	kafopaŭzo	kafopaŭzo		**15.00 - 16.30**
• IF en retrospektivo *(salono Jülich)* • Akcioj - fondusoj *(salono Köln)* • Balpreparoj *(Knajpo/manĝejo)*	• Mirinda Hindio *(salono Jülich)* • Fabeloj rusia popolo *(salono Köln)*	• IVU-prelego Esperanto-literaturo *(salono Jülich)* • 17-angula foto *(salono Köln)*	**Plilongigo** • Ekskurso al la Trilanada Punkto *(kafopaŭzo en kafejo 'Select', BE)*	**16.30 - 18.00**
	vespermanĝo	vespermanĝo	vespermanĝo	**18.30 - 19.30**
19.30 h: • **Silvestra bufedo ĉ. 21.30 h:** • **Silvestra balo 00.00 h:** • **Novjaraj kisoj**	• **Internacia Vespero** kun kontribuoj el la publiko *(salono Jülich)*	• **Adiaŭ IF! Adiaŭa Vespero** ni adiaŭas la longjaran IF-tradicion *(manĝejo)*	**Plilongigo** • **Lasta IF-Vespero** Vera kaj Mikaelo bonvenigas vin *(manĝejo)*	**20.00 – 21.30**
balo	Knajpo	Knajpo		**21.30 - ...**

— DETALA PROGRAMO —

SAB 27 DEC 2014

18.45 h **Interkona vespermanĝo** - varma (bufeda) manĝo
(manĝejo, teretaĝe) – ***pro la sekva programo bv. resti en la manĝejo!!***

20.00 h **Interkona vespero** - kun Mikaelo Bronŝtejn (Rusio)
(manĝejo, teretaĝe) - *ne preterlasu la okazon startigi la motoron de IF!!*

21.30 h Nia populara **IF-gastejo Knajpo** atendas vian unuan viziton ...
(Knajpo, enira halo)

♦ ♦ Niaj ekstertempaj ofertoj ♦ ♦

☺ **(1) - Tai-chi-chuan**, gimnastiko laŭ malnova ĉina tradicio; gvidas Barbara Poterucha, Belgio
antaŭ la matenmanĝo, **7.45 h - 8.30 h, ĉiutage *** en gimnastikejo, teretaĝe

☺ **(2) - Dancgimnasiko** kun profesia instruistino, gvidas Vera Vlasova, Rusio
antaŭ la programkomenco, **9.15 h -10.00 h, ĉiutage *** en gimnastikejo, teretaĝe
** escepte de 30 dec (ekskursa tago) kaj 1 jan (novjaro)*

♦ ♦ Nia oferto post la vespera programo ♦ ♦

☺ **28 dec: dancvespero, ekde 22.00 h** en gimnastikejo, teretaĝe
gvidas Liba Gabalda (Francio); *eventuale kun daŭrigo en alia(j) vespero(j)*

DIM 28 DEC 2014

07.45 h Tai-chi-chuan
09.15 h Dancgimnastiko
◄ ĉiumatene en gimnastikejo - *vd. nian supran anoncon*

10.00 h DIMANĈA MATINEO - gvidas Mikaelo Bronŝtejn, Rusio
Rusio kaj Ukrainio, la du ŝtatoj - ĉu frataj?
► *vd. resumon, paĝo 14*
(salono Jülich, dua etaĝo)

13.30 h Prelego de Harald Schicke, Germanio
Alia alirmaniero al malsanoj?
(salono Jülich, dua etaĝo)

"Ni kutimas rigardi malsanojn ĉiam el la vidpunkto de la tiel nomata universitata aŭ 'moderna' medicino. Se ni rigardus ilin el aliaj vidpunktoj, ni havus alian alirmanieron kaj alian ŝancon por resaniĝi ..."

13.30 h Sub gvido de Waldemar Ebel, Germanio
Promeno tra Jülich - *kun klarigo de la ĉefaj vidindaĵoj*
(renkontiĝo: ĉefa enirejo)

15.00 h **Kafopaŭzo en nia Knajpo**
(Knajpo, enira halo)

16.30 h Prelego de Baŝka Muhlemann, Svislando
Argentino: mirakloj de la naturo en la nordo *(parto I)*
► *vd. resumon, paĝo 17*
(salono Jülich, dua etaĝo)

— DETALA PROGRAMO —

DIM 28 DEC 2014

16.30 h Rakontoj de Nora Caragea, Germanio ► *vd. resumon, paĝo 17*
Aŭtora horo - Nora invitas sian legantaron
(salono Köln, dua etaĝo)

20.00 h La sorĉejon de latvaj kantoj prezentas grupo el Rigo
Vento Baltia
(salono Jülich, dua etaĝo)

21.30 h **Nia Knajpo atendas vin ...**
(Knajpo, enira halo)

22.00 h Invitas vin Liba Gabalda (Francio)
Esperanta dancvespero *(vd. anoncon, p.18)*
(gimnastikejo, teretaĝe)

Baŝka Muhlemann ***(IF-nro 22)***
invitas vin al
·· ekzerco de Polonezo ··
por la Silvestra Balo
> informoj: 28 dec, 19.30 h
en gimnastikejo

LUN 29 DEC 2014

10.00 h IVU-prelego de Alfred Schubert, Germanio
Energi-ŝanĝiĝo en Germanio *(parto I)* ► *vd. resumon, paĝo 13*
(salono Jülich, dua etaĝo)

10.00 h Prelego de Klaus Friese, Germanio
Vegana vivo el propra sperto ► *vd. resumon, paĝo 16*
(salono Köln, dua etaĝo)

10.00 h **Paroliga kurso** - sub gvido de Aĥman Junusov, Rusio
(salono Kelmis, dua etaĝo)

13.30 h IVU-prelego de d-ro Dieter Kleemann, Germanio
Romkatolika misia agado en Japanio kaj la sekvoj por la socia strukturo kaj politiko de la lando ► *vd. resumon, paĝo 13*
(salono Jülich, dua etaĝo)

13.30 h Sub gvido de Waldemar Ebel, Germanio
Apuda Brückenkopf-Park kun Napoleonaj fortikaĵoj
(renkontiĝo: ĉefa enirejo)

15.00 h **Kafopaŭzo en nia Knajpo**
(Knajpo, enira halo)

16.30 h Prelego de Baŝka Muhlemann (Svislando)
Argentino*:* Gaŭĉoj, Tango ... kaj Mateo *(parto II)* ► *vd. resumon, paĝo 17*
(salono Jülich, dua etaĝo)

16.30 h Prelego de Alfred Schubert, Germanio
Efike kunlabori kun ĵurnalistoj ► *vd. resumon, paĝo 15*
(salono Köln, dua etaĝo)

— DETALA PROGRAMO —

LUN 29 DEC 2014

20.00 h Vera Vlasova kaj Mikaelo Bronŝtejn: kun kantoj, vodko kaj oksikokoj ...
Rusa Vespero
(salono Jülich, dua etaĝo)

21.30 h **Nia Knajpo atendas vin ...**
(Knajpo, enira halo)

INFORMO:
observado de nokta ĉielo kaj kosmo
gvidas d-ro Wandel
informiĝu surloke!

MAR 30 DEC 2014

09.30 h **Tuttaga aŭtobusa ekskurso al Köln / Kolonjo** ► *vd. paĝojn 7 kaj 10*
ekveturo: parkejo antaŭ la domo, *ĉiĉeronas d-ro Winfried Schumacher, Köln*
10.30 h ĉ. 2 ½ hora promeno tra la urbo, kun klarigo de la ĉefaj vidindaĵoj
*13.00 h tagmanĝo (menuo) en tipa restoracio **'Keule'** ('klabo' - Heumarkt 56), urbocentre*
manĝo inkluzivita en la biletprezo, kromaj mendoj kaj trinkaĵoj individue pagendaj
15.00 h - aŭ pli (mal)frue - proprainiciata rondiro kaj vizito al la urbo
(ekz. katedralo, ĉ. 500 m; '4711-Kolonja Akvo', Glockengasse 10, ĉ. 1,5 km)
17.30 h ekveturo de nia aŭtobuso - en la sama haltejo kiel la antaŭtagmeza alveno
(en Komödienstrasse, en proksimeco de la katedralo; vi ricevos mapon en buso)
Ne-ekskursantoj: maten- kaj tagmanĝoj laŭ la kutima tempo en la manĝejo
► viaj surlokaj eblecoj: promenoj, urba butikumado, naĝejo *(malfermita 7 - 21 h, vd. p. 9)*

20.00 h Koncerto de Nataŝa Bertse (Svedio)
Barda liriko
(salono Jülich, dua etaĝo)

21.30 h **Nia Knajpo atendas vin ...**
(Knajpo, enira halo)

saŭno-informoj

La domo disponas pri bonekipita saŭno kun ripozejo – vizito senpaga!
Ni ofertas al vi jenajn saŭno-horojn:
► 28 kaj 30 dec: 21.30 - 24.00 h ▪ 1 jan: 13.30 - 16.00 h ▪ 2 jan: 21.30 - 24.00 h ◄

Ni antaŭvidas saŭnon por virinoj kaj viroj kune, sed laŭdezire eblas mendi apartigitan saŭno-tempon. Por vizito vi kunportu du grandajn mantukojn, unu por la komenca kaj fina sekigoj, dua por sidi aŭ kuŝi sur ĝi en la saŭnejo. Antaŭvidu trifojan ŝvitadon kaj dumtempe ripozu, rezignu pri alkohalaĵoj.

En IF-oficejo bv. peti niajn saŭno-rekomendojn ("10 saŭno-reguloj")

— DETALA PROGRAMO —

MER 31 DEC 2014

10.00 h IVU-prelego de Alfred Schubert, Germanio
Energi-ŝanĝiĝo en Germanio *(parto II)* ► *vd. resumon, paĝo 13*
(salono Jülich, dua etaĝo)

10.00 h Konferenco de Dima Ŝevĉenko, Mikaelo Bronŝtejn kaj Aĥman Junusov
Libro-eldonejo Impeto ► *vd. resumon, paĝo 14*
(salono Köln, dua etaĝo)

13.30 h IVU-prelego de prof. d-ro Amri Wandel, Israelo
La scienca revolucio de Einstein -
2015 centjara jubileo de la Teorio de Relativeco ► *vd. resumon, paĝo 12*
(salono Jülich, dua etaĝo)

13.30 h Prelego de Anna Striganova kaj Dima Ŝevĉenko, Rusio
Fabelaj mondoj ► *vd. resumon, paĝo 15*
(salono Köln, dua etaĝo)

15.00 h **Kafopaŭzo en nia Knajpo**
(Knajpo, enira halo)

16.30 h Lumbilda prelego de Brian Moon, Luksemburgio
IF en retrospektivo *(bildoj el la pasintjaraj IF-oj)*
(salono Jülich, dua etaĝo)

16.30 h Informprelego de André Weber, Germanio
Sukcesetoj per akcioj kaj fondusoj ► *vd. resumon, paĝo 17*
(salono Köln, dua etaĝo)

▪ Balpreparoj ▪
kiu volas helpi?
Volontuloj venu al nia Knjapo *(ekde 16.30 h)*

19.30 h **TRADICIA SILVESTRA BUFEDO**
sidlokoj en manĝejo ▪ bufeda prezento apud manĝejo ▪ dancoj ĉe Knajpo
Knajpo-servoj en kutima loko; ne eblas rezervi lokojn antaŭ 19.30 h, pro la preparlaboroj
Bufeda ordo: 1: fotoeblecoj – 2: sidiĝo – 3: salutvortoj – 4: manĝo

21.30 h **SILVESTRA BALO**
- post la bufeda manĝo ĝi inaŭguriĝas per polonezo sub gvido Baŝka Muhlemann

00.00 h **NI BONVENIGAS LA NOVAN JARON ...**
ankaŭ dum aliaj horzonoj - rusa, latva, islanda,israela, finna, angla ...

— DETALA PROGRAMO —

ĴAŬ 1 JAN 2015

10.00 h **Novjara brunĉo -** kombinita maten- kaj tagmanĝo (varma kaj malvarma)
► seninterrompe ĝis 13.00 h ► unue kafo ► ekde 11.00 h varmaj manĝoj
(manĝejo, venu laŭplaĉe, ekz. unue por la vekiĝo per kafo, due por varma manĝo...)

13.30 h Ni invitas vin al Novjara promeno, sub gvido de Waldemar Ebel kaj Floreal Gabalda
T**rans kaj laŭlonge de la rivero Rur** *(60 - 90 min, depende de via promenkapablo)*
(renkontiĝo: ĉefa elirejo)

13.30 h Nia hodiaŭa alternativa propono:
Novjara saŭno *(vd. nian anonceton, paĝo 24)*
(renkontiĝo: koridoro en la dua etaĝo, antaŭ la saŭnejo)

15.00 h **Kafopaŭzo en nia Knajpo**
(Knajpo, enira halo)

16.30 h Prelego de d-ro Amri Wandel, Israelo
Mirinda Hindio - bildoj kaj spertoj de vojaĝo
tra norda Barato, Rajhastano kaj Ladakh ► *vd. resumon, paĝo 16*
(salono Jülich, dua etaĝo)

16.30 h Prelego de Anna Striganova, Rusio ► *vd. resumon, paĝo 15*
Fabeloj de la rusiaj popoloj - el historia, filozofia kaj sciencaj vidpunktoj
(salono Köln, dua etaĝo)

<u>20.00 h</u> Kaptu la lastan okazon prezenti vin en IF - anonciĝu ĉe Mikaelo (nro 34)
Internacia vespero - kun viaj kontribuoj
(salono Jülich, dua etaĝo)

21.30 h **Nia Knajpo atendas vin ...**
(Knajpo, enira halo)

VEN 2 JAN 2015

10.00 h Prelego de Alfred Schubert, Germanio
Vetveturado per elektraj aŭtomobiloj ► *vd. resumon, paĝo 14*
(salono Jülich, dua etaĝo)

10.00 h Informprelego de Pieter Engwirda, Nederlando
Ĝemelaj urboj kaj Vikipedio ► *vd. resumon, paĝo 17*
- kunportu la demandaron kiun vi antaŭe ricevis perrete!
(salono Köln, dua etaĝo)

10.00 h Aŭtobusa ekskurseto - gvidas kaj tradukas André Weber, Germanio
Elfosejoj en la regiono Hambach
kun impona rigardo al la laborintensa ilaro de la regiono kun 2,5 miliardoj da tunoj de karbo
(renkontiĝo: parkejo; kostoj: 3 € popersone, maks. 40 pers.)

— DETALA PROGRAMO —

VEN 2 JAN 2015

13.30 h IVU-prelego de prof. d-ro Amri Wandel, Israelo ► *vd. resumon, paĝo 12*
Vivo sur foraj planedoj - la revolucio de la spac-teleskopo Kepler
(salono Jülich, dua etaĝo)

13.30 h Prelego de Dieter Rooke, Svislando
Eksperimenta leciono pri didaktiko ► *vd. resumon, paĝo 16*
(salono Köln, dua etaĝo)

15.00 h **Kafopaŭzo en nia Knajpo**
(Knajpo, enira halo)

16.30 h IVU-prelego de Mikaelo Bronŝtejn, Rusio
La monda Esperanto-literaturo: enspezo de Rusio ► *vd. resumon, paĝo 13*
(salono Jülich, dua etaĝo)

16.30 h Prelego de Alfred Schubert, Germanio
La 17-angula foto ► *vd. resumon, paĝo 16*
(salono Köln, dua etaĝo)

20.00 h Nia speciala programo: iom trista, ankaŭ festena, kun ŝaŭmvino
Adiaŭa vespero - Adiaŭ IF! *(kun disdono de la AIS-IVU-atestoj)*
(► manĝejo, teretaĝe)

21.30 h **Lasta ŝanco por viziti kaj ĝui nian Knajpon ...**
(Knajpo, enira halo)

SAB 3 JAN 2015

07.30 h **Matenmanĝo** *(ĝis 09.30 h; kiel kutime)*

- ☺ **Se hodiaŭ vi hejmenveturas kaj ne partoprenas la plilongigan tagon:**
- ☺ **Plenigu la enketilon kaj notu viajn impresojn pri IF-Jülich!**
- ☺ Laŭdezire: tagmanĝo = 9.00 €; lunĉpakaĵo = 6 € *(bv. informi jam tagon antaŭe)*
- ☺ Mendinte tagmanĝon vi povas ankaŭ partopreni la matenan prelegon
- ☺ **Laŭdezire transporta servo al la stacidomo Jülich**
- ☺ **Ne forgesu redoni vian ĉambro-ŝlosilon!**

ADIAŬ IF!
Dankon al vi ĉiuj!
Bonan hejmenvojaĝon!

— DETALA PROGRAMO —

► Plilongigo: 3-a de januaro ĝis 4-a de januaro 2015 *(post matenmanĝo)*

SAB 3 JAN 2015

10.00 h Prelego de Karl Breuninger, Germanio
Mia eksterordinara rilato kun Rusio kaj Sovetio ► *vd. resumon, paĝo 17*
(salono Kelmis, dua etaĝo)

13.30 h Komuna aŭtobusa veturo - ĉiĉeronas Trude Sinno, Germanio/Nederlando
Trilanda punkto de Germanio, Nederlando kaj Belgio
Veturo tra germana Aachen, poste al nederlanda Vaals, daŭrigo tra la 'kvarlima vojo' al la Trilanda Punkto, fine al belga Kelmis. Kelmis apartenis al la neŭtrala ŝtato Moresnet; la 'eta tortopeco' famiĝis, ĉar fondiĝis E-ŝtato en aŭgusto 1908, en la siatempa kultura domo 'Select'. Ni ĝuos kafopaŭzon en la fondo-salono 'Amikejo', kun prelego de M. Schrymecker.
***Buskostoj estas inkluzivaj** - kukoj kaj trinkaĵoj en 'Amikejo' estas individue pagendaj.*
Ekveturo: parkejo, antaŭ la domo

20.00 h Vera kaj Mikaelo bonvenigas vin - kun trinkaĵoj, kantoj, ŝercoj, rememoroj kaj babiloj
Lasta vespero en IF ...
(► manĝejo, teretaĝe)

Ĉu vi ŝatas partopreni nian plilongigan tagon?
Aliĝu surloke kaj pagu nur 16 %
de la resp. kategorio!
Jam pli ol 35 aliĝoj ...

DIM 4 JAN 2015

08.30 h **Matenmanĝo / adiaŭo**
vd. ankaŭ paĝon 27

▲ 'Amikejo", renkontiĝejo de esperantistoj, hodiaŭ gastejo 'Select' en belga Kelmis (iama neŭtrala ŝtato Moresnet, 1815-1919). Loka esperantisto Mathieu Schrymecker informos pri 'Amikejo'.
◄ 'Drilandenpunt' - Trilanda Punkto kun la flagoj de Nederlando, Belgio kaj Germanio. Promenu de unu al la alia lando ...

— UTILAJ INFORMOJ —

PRELEGOJ

Aspektoj de la kadra kaj aliaj temoj estas traktataj en prelegoj, seminarioj kaj kursoj. Diskutoj estu eblaj kaj bonvenaj. Prelego-tempo 1,5 h *(90 min)*. Resumon de pluraj prelegoj vi trovas en konciza formo en la sekvaj paĝoj. Bonvolu esti akurataj kaj ne fumu en la salonoj kaj koridoroj!

Atentu la programon ĉe **IF-informoj**, teretaĝe, kaze de subite necesa ŝanĝo.

Prelega horaro:
10.00 h - 11.30 h
11.30 h - 15.00 h ▪ 16.30 h - 18.00 h

Dancgimnastiko kun instruistino

Ĉu vi ŝatas gimnastiki? Kaj danci? Kaj fine: ĉu vi ŝatus kunigi tiujn ĝuindajn okupojn? Tiuokaze venu al la dancgimnastiko, gvidata de Vera Vlasova kaj - ricevante la ĝuon, ŝargu vian animon per bonhumoro.

En gimnastikejo: ĉiutage je 9.15 h

KURSOJ

- ☺ **Dancgimnastiko** - kun Vera Vlasova, Rusio
  ĉiutage, escepte 30 dec + *1 jan - vd. apude*
- ☺ **Observado de la nokta ĉielo -**
  gvidas d-ro Amri Wandel, Israelo
- ☺ **"Tai-chi-chuan"** - gimnastiko laŭ malnova ĉina tradicio, gvidas Barbara Poterucha, Belgio
  ĉiutage, escepte 30 dec + *1 jan (resp. laŭ interkonsento)*
- ☺ **Paroligaj kursoj** - por komencintoj, gvidas Aĥman Junusov, Rusio

ĜENERALAJ INFORMOJ

Normala enirprezo al la parko estas 3.50 €. Nepre utiligu do vian senkostan IF-bileton!

- ☺ **Vizito al la apuda parko kaj urbo: '**Brückenkopf-Park' troviĝas tuj apude, vi petu senkostan bileton en la IF-oficejo kaj transdonu ĝin al la kasist(ino). Konata ĝi estas pro la Napoleonaj fortikaĵoj, pro la bestĝardeno kun enlandaj bestoj kaj pro la iama hortikultura ekspozicio. La urbon mem vi atingu rondirante la IF-domon kaj poste trans la ponto de Rur, ĉ. 800 m. Aŭ peraŭte reveturante ĝis la Rondo kaj sekvante la trian elveturejon, entute ĉ. 2,5 km.
- ☺ **Deĵorhoroj de urbaj magazenoj:** ĝenerale, lunde - sabate, de 8.00 h - 20.00 h.Malgrandaj vendejoj ofte jam pli frue fermas, ĉefe sabate. Dimanĉe ĉiuj vendejoj estas fermitaj!
- ☺ **Monaŭtomatoj:** En la urba centro resp. survoje irante trans la ponto de Rur. Viajn IF-kotizojn vi povas pagi (kaj laŭbezone ankaŭ peti kontantan monon) en nia IF-oficejo pere de ec/giropay- kaj kreditkartoj (Visa- aŭ MasterCard). Ni akceptas ankaŭ francajn ĉekojn.
- ☺ **Kuracista helpo:** Partoprenas tutsemajne d-ro Dieter Kleemann, kiu estas praktikanta kuracisto, IF-nro 15. Aŭ voku la urban kuracistan helpon (tel-nro 112).

8-a IVU - Internacia Vintra Universitato

Internacia Vintra Universitato (IVU) festas en Jülich sian 8-jaran datrevenon. IVU estas la vintra ekvivalento de la Internacia Kongresa Universitato (IKU), kiu antaŭe nomiĝis Internacia Somera Universitato (ISU). IVU unuafoje okazis en 2007 dum la IF en Düsseldorf, samloke en 2008, tri sesioj okazis en Nördlingen kaj du en Xanten kaj Dortmund. IVU samtempe estas studadsesio de AIS. Niaj ĉi-jaraj ofertoj konsistas el prelegoj pri Einstein (Teorio de Relativeco) , Kepler-teleskopo, Rom-katolika misia agado en Japanio, monda Esperanto-literaturo kaj energi-ŝanĝiĝo en Germanio. IVU estas malferma por ĉiu IF-ano. Kiel en IKU, fine de ĉiuj IVU-prelegoj, estos la ebleco ekzameniĝi kaj akiri AIS-atestojn.

Amri Wandel (IVU-rektoro)

D-ro Amri Wandel (Israelo)

» La scienca revolucio de Einstein - 2015 centjara jubileo de la Teorio de Relativeco «

IVU-8 PRELEGO



Samjare kun la unua universala Kongreso, en 1905, juna sciencisto nomata Albert Einstejn publikigis novan teorion kiu revoluciigis nian komprenon de spaco kaj tempo: la Speciala Teorio de Relativeco. Dek jarojn poste, en 1915, li publikigis multe pli vastan teorion kiu inkluzivis ankaŭ la graviton - la Ĝenerala Teorio de Relativeco. La scienca mondo iom dubis pri ĝi - ĝis ĝia historia pruvo per la observado de la suneklipso en 1919. Ni ekvidos per laikaj terminoj la esencon de tiuj du teorioj.

IVU-8 PRELEGO

D-ro Amri Wandel (Israelo)

» Vivo sur foraj planedoj - la revolucio de la spac-teleskopo Kepler «

Ĉiam homoj scivolis, ĉu troviĝas aliaj mondoj, similaj al la Tero, kun vivaj estaĵoj. Jam de kelkaj jarcentoj astronomoj scias, ke ni estas ĉirkaŭitaj de miliardoj da steloj kiuj efektive estas sunoj, sed nur antaŭ du jardekoj oni komencis malkovri planedojn ĉirkaŭ tiuj steloj. Tamen, la trovitaj planedoj ne estis taŭgaj por vivo kaj nur en 2010, kiam komencis funkcii la spacteleskopo Kepler, oni komencis trovi ankaŭ planedojn similajn al Tero, kelkaj eĉ kun temperaturo taŭga por vivo. Ni aŭdos pri la projekto Kepler, kiu trovis pli ol 3000 novajn planedojn dum tri jaroj - kaj pri la metodoj per kiuj la astronomoj esperas ene de kelkaj jaroj povi esplori, ĉu ekzistas vivo sur tiuj planedoj.

Amri estas profesoro pri astrofiziko en la universitato de Jerusalemo, en AIS, gastprofesoro en Usono

► Niaj IVU-prelegoj estas signitaj per dekstra indikilo. IVU estas malferma por ĉiu IF-ano ◄

— PRELEGA ENKONDUKO —

D-ro Dieter Kleemann (Germanio)

» Romkatolika misia agado en Japanio kaj la sekvoj por la socia strukturo kaj politiko de la lando «

IVU-8 PRELEGO

La misiista agado de jezuitaj pastroj kaj la politiko de la jezuita ordeno en Japanio kaŭzis gravan politikan krizon ĉe la tiamaj militaraj potenculoj kaj komence de la 17-a jarcento la reganta ŝoguno en EDO absolute malpermesis kristanismon kaj dum pli ol 200 jaroj japanaj kristanoj estis kruele persekutitaj. Por eviti eksterlandan influon meze de la 17-a jarcento Japanio preskaŭ komplete sinizoliĝis ĝis la jaro 1853. En 1865 okazis "miraklo": en novkonstruita romkatolika preĝejo en Nagasaki subite aperis pluraj homoj dirante ke ili kaj iliaj praavoj kaŝe konservis kristanan kredon. Fakte dum pli ol 200 jaroj - malgraŭ ebla mortpuno - kaŝe daŭrigis sian kredan kutimon tute sen helpo de iu pastro. Multaj de la prauloj iam fuĝis al izolitaj insuloj - ĉefe al la Goto-insularo okcidente de Nagasako.

Bazo estas plurfoja vizito al la Gubernio de Nagasaki kaj plej aktuale vizito al la Goto-insularo en la jaro 2013, kune kun japanaj geamikoj. Detaloj pri tiu epoko kutime ne estas bone konataj.

Mikaelo Bronŝtejn (Rusio)

» La monda Esperanto-literaturo: enspezo de Rusio «

IVU-8 PRELEGO

Se oni rememoru, ke Ludoviko, en la jaro kiam li eksklamaciis “Ho mia kor’!” estis civitano de Rusio, ankaŭ ke la unua proza traduko, aperinta en Esperanto, estis “La neĝblovado” de Puŝkin, oni akceptos la fakton, ke la Esperanto-literaturo (samkiel la lingvo mem) naskiĝis en Rusio. Bone, estus preteksto por ioma fiero, sed ne tro granda, se ne aperus poste Miĥalskij kaj Varankin, Ĥoĥlov kaj Nekrasov, kaj multaj-multaj aliaj talentegaj aŭtoroj, elektintaj ĝuste la internacian lingvon por komuniki al la mondo siajn opiniojn, revojn kaj aspirojn. Retrospektive foliumante milojn da legindaj paĝoj oni ja rajtas fieri, ke konsiderinde granda peco en la bongusta kuko de la Esperanto-literaturo estas bakita de rusoj kaj rusianoj. La fieranto kaj kunbakanto Mikaelo Bronŝtejn provos pruvi tion per sia prelego ...

Mikaelo verkas originale kaj tradukas. En 2003 li iĝis laŭreato de la literatura premio Antoni Grabowski.

Alfred Schubert (Germanio)

» Energi-ŝanĝiĝo en Germanio «

IVU-8 PRELEGO

La prelego okazos en du partoj. Ni diskutas la demandon kion oni ekz. faras en suda Bavario por utiligi daŭripovajn kaj novajn energifontojn. Alfred montras diversajn elektitajn ekzemplojn. Bonvenaj estas ĉiuj, kiuj interesiĝas pri daŭripova evoluo, sed ankaŭ posedantoj kaj konstruontoj de domoj, same ĉiuj energi- kaj / aŭ monŝparemuloj.

Alfred, profesia ĵurnalisto, verkas dum pli ol 20 jaroj artikolojn pri la temo kaj ekinteresiĝas pri novaj resp. alternativaj energiformoj ekde la jaro de la energikrizo en 1973.

— PRELEGA ENKONDUKO —

Alfred Schubert (Germanio)
» Vetveturado per elektraj aŭtomobiloj «

En 2014 okazis granda vetveturado en Bavario, t.n. "eRUDA" (mallongigo de "elektrisch rund um den Ammersee" = elektre ĉirkaŭi la lagon Ammersee). 160 veturantoj de elektraj aŭtomobiloj, motorcikloj kaj bicikloj dum du tagoj veturis tra Supra Bavario. La "Kesselbergrennen" (= vetveturado sur la montara strato "Kesselberg") montris, ke elektra aŭtomobilo povas superi la konvencian. Alfred montras multajn fotojn de diversaj malnovaj (eTransalp) kaj novaj elektraj veturiloj kaj informas pri ili. Celgrupo: Ĉiuj interesiĝantoj pri aŭtomobiloj kaj/aŭ elektra veturado.

► Pro ĝia aktualeco la ĉi-sekva prelego okazos kiel matineo en 28 dec 2014, 10:00 h ◄

Mikaelo Bronŝtejn (Rusio)
» Rusio kaj Ukrainio, la du ŝtatoj - ĉu frataj? «

Aleksej Miĥajloviĉ

En 1954 Mikaelo en koruso de kvinjaraĝaj infanoj kante glorigis la 300-jaran jubileon de la aliĝo de Ukrainio al la Rusa carlando. Sesdek jarojn poste, kiam malpaco tordas la du ŝtatojn, li prezentos retrospektivon de la rilatoj inter la du ŝtatoj kaj popoloj tra jarcentoj, tuŝante la prahistorion kaj pli detale traktante la periodon ekde la fama kontrakto de Aleksej Miĥajloviĉ, la rusa caro, kaj B. Ĥmelnickij, la ukraina ribelulo-hetmano ĝis la lastatempaj eventoj. Kantoj, poemoj kaj ilustraĵoj garnos la prelegon.

Bogdan Ĥmelnickij

Dima Ŝevĉenko, Mikaelo Bronŝtejn, Aĥman Junusov (Rusio)
» Libro-eldonejo «

Ĉu vi regule legas librojn de la eldonejo 'Impeto'? Dum la 22 jaroj de la eldon-agado 'Impeto' produktis i.a. kelkcent librojn en la internacia lingvo. Iuj el ili eble foje trafis en viajn manojn, anstataŭiginte ĉetelevidan aŭ ĉekomputilan gapadon. Ĉi foje la ĉefo de 'Impeto', Dima Ŝevĉenko, la desegnistino Anna Striganova, la aŭtoroj Mikaelo Bronŝtejn kaj Abduraĥman Junusov invitas vin partopreni la grandan konferencon de legantaro. Dum la konferenco vi rajtas kaj eĉ estas petataj prezenti viajn impresojn pri la literatura kaj teknika kvalito de la libroj, kiujn vi havas en via biblioteko. Viaj opinioj, aludoj, konsiloj, akceptotaj kun estimo kaj sincera danko, certe utilos por plibonigi la laboron de "Impeto". Dum la konferenco vi ricevos ankaŭ kompletajn kaj fidindajn informojn pri la freŝeldonitaj libroj, pri la problemoj kaj planoj de la eldonejo. Profitu ankaŭ la eblecon senpere alparoli la eldonistojn kaj la aŭtorojn por ricevi respondojn al ĉiu ajn demando, maturiĝonta en via kapo.

— PRELEGA ENKONDUKO —

Anna Striganova (Rusio)
» Fabeloj de la rusiaj popoloj - el historia, filozofia kaj sciencaj vidpunktoj «

Antaŭ ol oni komencis konstrui preĝejojn sur nia tero, tre longe lignaj idoloj ornamis verdajn montetojn kaj homoj preĝis je la arbaroj kaj je la riveroj. Kaj antaŭ tio, homoj prikantis Urson kaj kredis, ke ĝi estas ilia frato. En la bonkoraj akvujoj loĝis virinoj, blankaj kaj flugilhavaj kiel birdoj kaj gardis ĉiujn homojn, kiuj protekton bezonis. Sed tio okazis tre-tre longe antaŭe, tro longe kaj por la kronikoj, kaj por la prifosoj – la memoro estas kovrita de la nebulo, de la tero, de la peza kurteno de la tempo. Sed ekzistas en la mondo unu fonto, kiu memoras ĉiujn ajn kredojn, ĉiujn ajn epokojn – memoras kaj per la malvarma akvo verŝas en la manojn. Nomo de tiu fonto estas «fabelo». La unua genro de arto en la homa mondo, fabelo aperis en la nememoreblaj pratempoj same libera kaj de ajna religio, kaj de ajna vero, apartenanta nur al homo, kaj gardanta ĉiujn liajn sciojn, ĉiujn liajn fantaziojn, ĉiujn liajn revojn tra diversaj kulturoj, tra senfino de la tempo. Fragila neĝulino, parolanta urso, petolanta koboldo kaj avinjo Jaga – ĉiuj estas vortoj en la lingvo. Per tiu lingvo parolas kun ni nia pasinteco, kaj per tiu lingvo ĝi parolos post miloj da jaroj, ĉi foje – ja povas esti – parolos pri ni ...

Anna Striganova, Dima Ŝevĉenko (Rusio)
» Fabelaj mondoj «

Novjarfesto - estas la plej antikva festo de la mondo, tio estas la tago, eĉ pli precize, la nokto dum kiu - inter veno de la mallumo kaj la aŭroro - estas malfermitaj pordegoj inter la pasinteco kaj estonteco, inter nia mondo kaj mondo de sorĉo. Pro tio la Novjarfesto estas la plej ĝusta tempo por la fabeloj, ĉar iliaj herooj vagas inter ni, kaj la mirakloj vere okazas. En la programero "Fabeloj mondoj" ni prezentos al niaj spektantoj la projekton de Dima kaj Anna, kiu estas dediĉita al iliaj fabeloj: verkitaj, pentritaj kaj modelitaj, ankaŭ pri la fenomeno mem de la fabelo - la plej longviva ĝenro en la historio. Venu, multo estos nova kaj tre interesa!

Alfred Schubert (Germanio)
» Efike kunlabori kun ĵurnalistoj «

Profesia ĵurnalisto informas pri la funkciado de gazetara sistemo. Kion vi devas fari por atingi la atenton de ĵurnalisto. Vi ricevos informojn "el la alia vidpunkto". Celgrupo: respondeculoj pri informado en komunutilaj asocioj (esperantaj kaj neesperantaj) kaj posedantoj de etaj entreprenoj.

— PRELEGA ENKONDUKO —

Klaus Friese (Germanio)
» Vegana vivo el propra sperto «

En Vikipedio ni legas "Veganismo estas filozofio kaj vivmaniero, kiu provas eviti kie ajn praktike fareble ĉiujn formojn de ekspluato kaj krueleco al bestoj por manĝaĵoj, vestoj kaj aliaj uzoj". Ne eblas trakti tiun ampleksan temon dum unu eta prelego. Estu do kontenta kun kelkaj elektitaj fokusoj kiujn oni trovas en la libro "The China Study" ('La ĉina Studo') en kiu T. Colin Campbell kaj la filo Thomas M. Campbell el Usono prezentis interesajn rezultojn kaj multajn argumentojn por vegana manĝado. Kompreneble temas ĉefe pri la kontribuo de la nutraĵoj al nia saneco kaj korpopezo. Vegana dieto ne estas komplika.

D-ro Amri Wandel (Israelo)
» Mirinda Hindio - bildoj kaj spertoj de vojaĝo tra norda Barato, Rajhastano kaj Ladakh «

Hindio (Barato) estas sub-kontinento kun multaj, ege variaj naturaj, kulturaj kaj arkitekturaj vidindaĵoj. Amri alportos freŝajn fotojn kaj travivaĵojn de unumonata vojaĝo tra la princaj palacoj kaj fortikaĵoj de Raghastano, la sankta riverego Gango, la Himalajaj pejzaĝoj de Ladakh, la sub-himalajaj pejzaĝoj de Manali kaj Dharamsala, kaj kompreneble la mirindaj arkitekturaj trezoroj de Taj-Mahal (vd. la foton) kaj apudaj palaco-plenaj urboj.

Amri vizitis la sub-kontinenton en somero 2014, okaze de studvojaĝo.

Dieter Rooke (Svislando)
» Eksperimenta leciono pri didaktiko «


Andreo Cseh [Ĉe]

Venontjare, 13-16 majo 2015, okazos la tria tutmonda kolokvo pri instruado de Esperanto. Ĝin organizas Mireille Grosjean, svisa instruistino, en kunlaboro kun UEA. Tiu ĉi grava evento en urbo Neuchatel digne kontribuos al la 60- jara jubileo de la rezolucio de Montevideo. Dieter nomas sian prelegon "eksperimenta ", kvankam tiu ĉi metodo jam estis vaste aplikata, eĉ en bazaj lernejoj. Ĝi postulas aktivan partoprenon de lernantoj. Post 15-minuta enkonduko de la temo, duopoj el la gelernantoj pliprofundigas la ĉefan enhavon. Aparte kvalifikitaj por tiu ĉi leciono evidente estas instruistoj kaj kursgvidantoj, sed la programero ne taŭgas por tutkomencantoj .

Alfred Schubert (Germanio)
» La 17-angula foto «

Nova prelego - enhavo ankoraŭ sekreta. Kunportu fotilon - ĉiuj kiuj ŝatas foti kaj volas publikigi fotojn.

— PRELEGA ENKONDUKO —

Nora Caragea (Germanio)
» Aŭtora horo «

Nora rakontas pri siaj libroj, kiujn ŝi tradukis kaj eldonis. Ŝi mencias pri ĝiaj enhavoj, parte ankaŭ pri la estiĝo ktp. Ŝi legos por vi kelkajn fragmentojn aŭ citaĵojn el la libroj. Vi vidos, ke ne temas 'nur' pri infanlibroj, sed temoj por ni ĉiuj. Koran bonvenon!

Baŝka Muhlemann (Svislando)
» Argentino - mirakloj de la naturo, Gaŭĉoj, Tango kaj Mateo «

La prelego okazos en du partoj. Nordokcidenta Argentino estas konsiderata kiel la plej bela en la lando, pitoreskaj pejzaĝoj, multkoloraj montoj kaj arbaro de kaktoj, senmakule blanka kaj senfina dezerto, proksimume 275 akvofaloj ... En la dua parto vi konatiĝas kun la kulturo de Gaŭĉoj, kun iliaj famaj dancoj, la simbolo de fiereco, kuraĝo kaj lerteco. Tango kreskis en la malriĉaj kvartaloj de Bonaero, ĉar komence konsiderata kiel malmorala, sed intertempe fariĝis la plej populara latina danco. La tradicia trinkaĵo de la sudo de Sudameriko estas la teo 'Mateo'.

Karl Breuninger (Germanio)
» Mia eksterordinara rilato kun Rusio kaj Sovetio «

Fine de la dua mondmilito la alianco (Usono, Britio kaj Sovetio) kontraŭ nazia Germanio interkonsentis ke Germanio devus kompensi la terurajn damaĝojn en la venkintaj ŝtatoj. Tiu reparacio entenis ankaŭ homan laboron. Sovetio en oktobro 1946 perforte translokigis plurajn milojn da sciencistoj, inĝenieroj kaj teknikistoj kun familianoj al diversaj lokoj. Tie ili devis labori dum multaj jaroj. Karl, kiel infano de unu el tiuj sciencistoj, vivis dum pli ol 11 jaroj (ĝis 1958) en diversaj urboj de Sovetio. Post la reveno al okcidenta Germanio, kaj aparte post la disfalo de Sovetio, Karl konservis kaj revigligis la kontaktojn al Rusio, ankaŭ dank' al Esperanto.

André Weber (Germanio)
» Sukcesetoj per akcioj kaj fondusoj «

Antaŭ jaroj en urba librejo André hazarde trovis libreton kun la subtitolo "Akiru la unuan milionon post nur sep jaroj". Dubante, ĉu tio povas esti serioza libro, li heziteme trafoliumis kaj rimarkis, ke ĝi estas sufiĉe bonstile skribita. Li prunteprenis kaj tralegis ĝin kelkfoje, en sekvaj jaroj eĉ plurajn librojn de la sama aŭtoro ... fine li decidis elprovi siajn sciojn kaj malfermis deponejon. Nete li atingis 20%-an profiton, malsufiĉe por fariĝi milionulo, sed por agrable manĝi en restoracio ja sufiĉis. André invitas ĉiujn kiuj interesiĝas pri prudenta moninvesto kaj klarigas per konkretaj ekzemploj. Tamen, temas nur pri propraj spertoj kaj planoj; nek estos konsiloj, nek kunlaboro kun firmao. Li invitas al vigla diskutado.